FENIKSO
INFORMILO POR
AMIKA
RONDO DE
ESPERANTAJ-
KOLEKTANTOJ

Nr. 19. 1. 2. 1972. Kvara jaro nr. 1

## La grekaj glumarkoj.

Sonas kiel aventuro, sed tamen estas fakto, mi ricevis respondon al mia demando en Fenikso nr. 14 pri la grekaj glumarkoj.

Greka samideano povis traduki la neklaran tekston laŭ la bildo.

S-ro Kimon G. Eliopulos skribis, ke li neniam antaŭe vidis tiun markon kun la "4 pordegoj", sed li povis traduki la tekston jene:

La enskribo sur la bendo estas: Internacia ESPERANTO lingvo. La bildo montras la templon "Partenono" de diino Atena (Minerva), kaj la teksto sur la pordegoj nomas diversajn kvalitojn ĉe la lingvo en daŭrigo de la benda enskribo:

1-a. Progresigas la komercon,
2-a. Konstantigas pacon internacian,
3-a. Servas bezonojn internaciajn,
4-a. Interfratigos la popolojn.

La teksto sur la longa linio plej sube:
"Lernu Esperanton - ĝi estas facila".

Do mia teorio, ke tiu marko fakte ne rilatas al la greka kongreso en 1932 estas ĝusta. La marko estas nur simpla propagandmarko por nia lingvo, sed ĝi estas tiel malofta, ke oni povas rigardi ĝin kiel raraĵon.

Sed ĝi do ne prave havas lokon en katalogo por porokazaj markoj.

Anstataŭ ĝi la alia montrita marko prenas la lokon kiel nr. 202, ĉar ĝi estas vere por-okaza kaj estis la simbolo por la unua greka kongreso. S-ro Eliopulos bedaŭrinde ne povus havigi la markon, sed li sendis fotokopion de kongres-karto subskribita de la konata D-ro A. Stamatiades kaj ilustrita kun bildo de la glumarko kun la diino Athena ĉe la teksttabulo.

Mi estas tre kontenta pri la rezulto de mia demando, eĉ malgraŭ ke mi ne trovis la markon, sed ĝi helpis al korektigo en mia katalogo, kio estas tre bona kaj kontentiga.

Mia plej bona danko al s-ro Eliopulos.

Reinhold Jensen




## Nova malnova glumarko

Nia nova ano, s-ro J. F. Mazánek, alportis novaĵon al ni, nome malnovaj glumarkoj de 1959 eldonitaj tiam okaze de jubileo de la "Esperantista Rondeto" en Slezská Ostrava.

Tiu organizo ŝanĝis tiam sian nomon al "Klubo Esperanto", kaj okaze de tio oni eldonis la gumitajn glumarkojn. Ili estas faritaj per kaŭĉuka stampilo en diversaj koloroj. Sed ĉar la gumo estis malbona, tro glueca, restas nun preskaŭ nur ne-gumitaj markoj.

Laŭ koloroj troviĝas: a) blua, b) bruna n., c) turkisa, d) nigra kaj e) verda - ĉiuj sur blanka papero.

La verda marko havas nur la supre montritan tekston, sed la aliaj koloraj markoj estis stampitaj per nova, ronda stampilo en verda koloro montranta la kluban nomon aranĝita ĉirkaŭ centra stelo kun E: "Klubo Esperanto Slezská Ostrava - Lidový dům Kamenec".

Oni neniam antaŭe sciis pri tiuj markoj, sed ili ja estas vere interesaj, kaj ĉar ili aperis en la fama Zamenhofjaro kaj indikas tion en la teksto, oni ja fakte povus kunpreni ilin en kolekto de porokazaj glumarkoj, kaj mi eble nomos ilin en venonta aldono al la Glm-katalogo.

Veraj scivolemuloj povos skribi senpere al Mazánek. Eble li interŝanĝe povos havigi ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn.

Reinhold Jensen

---

GLUMARKOJ 1971. (Daŭrigo)

12) 7-a int. Esp-ferio en Miedzygórze, Polujo. 17 - 30/9 1971. (H)(30x22). trpk. fol. Nigra teksto kaj verda stelo kaj la vorto Esperanto.

13) Okaze de Esperanto-kurso en la nederlanda televido 1971 estas eldonita glumarko. Trapikita folio kun 5x5= 25 markoj.(K)(40x40) Granda E.stelo ĉirkaŭita de ringo. Supre kaj malsupre nur la teksto: teleac esperantocursus. - La sama marko troviĝas en granda formato (100x100), trĉ. Koloro: verda. La marko estas bela kaj donas okulfrapan ornamon sur kovertoj k.s., sed fakte ĝi ne havas grandan reklamvaloron, ĉar ĝi ne parolas pri loko aŭ tempo por la kurzo. Havebla ĉe s-ro H. T. Menges, Godfred v. Bouillonstr. 59. Haarlem. Nederlando. Prezo: fl. 0,50 + sendkostoj. (Lakemond).

STAMPO-SERVO de AREK. Frank Tichý, Slapanov 87. Ĉe H. Brod. ĈeĤoslovakio

**Listo de haveblaj E-stampoj** Januaro 1972.

Prezo 2 rkp por peco, se ne alie indikita.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1956 | JA | Tokio 43-a nacia | sp kov prezo 4 rkp |
| 1957 | JA | Nagoya 44-a nacia | pk prezo 4 rkp |
| 1959 | PO | Varsovio 44-a UK | pk kun E-pm serio |
| 1962 | HU | Budapest 14-a IFEF | sp pk UTK kun E-pm |
| 1962 | PO | Poznan. 75 jaroj. dato 15.12. | kov |
| 1964 | GE | Soltau, 42-a nacia | sp pk |
| 1964 | PO | Poznan, 33-a foiro | kov |
| 1964 | PO | Poznan, 105a naskiĝtago | kov |
| 1964 | PO | Warszawa. datreveno | kov |
| 1965 | PO | Wolsztyn. pola kgr | kov |
| 1965 | PO | Zielona Gora. E-renkontiĝo | pk kaj kov |
| 1965 | PO | Poznan. 34a foiro. urbdomo | sp kov |
| 1965 | PO | - - hotelo | sp kov |
| 1965 | PO | Jelenia Gora. geografia semajno | sp kov |
| 1965 | PO | Miedzygorze. E-ferio | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Bystrzyca Kl. E-renkonto | kov |
| 1965 | PO | Olsztyn. semajno de korespond. | pk |
| 1965 | PO | Zielona Gora " | pk |
| 1965 | PO | Bialystok. jaro de kunlaboro | kov |
| 1965 | PO | Gdansk. " | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Katowice " | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Krakow " | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Lodz " | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Poznan " | pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Szczecin " | E-pk aŭ kov |
| 1965 | PO | Warszawa " | pk |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] " | pk |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] " | [illegible] |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1966 | PO | Poznan [illegible] | E-pk aŭ kov |
| 1966 | CE | Podebrady Ŝakturniro | pk aŭ kov |
| 1966 | PO | Poznan 35-a foiro | sp pk aŭ kov |
| 1966 | HU | Budapest 51-a uk | pk aŭ kov |
| 1966 | PO | Poznan semajno de korespond | kov |
| 1966 | PO | Zielena Gora " | E-pk aŭ kov |
| 1966 | PO | Bystrzyca Kl. 2-a renkonto | pk aŭ kov |
| 1967 | GE | Fulda 19-a IFEF | pk aŭ kov |
| 1967 | GE | Hamburg 45-a nacia | pk |
| 1967 | CE | Podebrady ŝakturniro | pk aŭ kov |
| 1967 | CE | Opava E-kulturfestivalo | pk aŭ kov |
| 1967 | PO | miedzygorze E-ferio | E-pk aŭ kov |
| 1967 | GE | Karl Marx Stadt. Esp 80 jara | sp pk aŭ sp kov |
| 1968 | PO | Lodz 60 jaroj de Esp en Lodz | kov |
| 1968 | GE | München 46-a nacia | pk |
| 1968 | BE | Bruxelles-Brüssel. 5o-a nacia | ambaŭ sta sur 1 kov.prez.4 rkp |
| 1968 | CE | Podebrady ŝakturniro | pk aŭ kov |
| 1968 | HI | Madrid. 53-a UK | pk |
| 1969 | FR | Paris Varbsta por E-kgr | kov |
| 1969 | FR | Strasbourg. E-kgr. | sp pk aŭ sp kov |
| 1969 | SVE | Göteborg sveda kgr | sp pk |
| 1969 | FR | Avignon 21-a IFEF | sp kov |
| 1969 | PO | Krakow ministа akademio | E-pk aŭ kov |
| 1969 | HU | Budapest. infandesignaĵoj | pk |
| 1969 | PO | Poznan 38-a foiro | E-pk aŭ kov |
| 1969 | HI | La Laguna nacia kgr | pk aŭ kov |
| 1969 | HU | Gyula. SEU | pk |
| 1969 | HU | Abaliget. naturamika | pk |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1969 | FI | Helsinki. 54-a UK | pk aŭ kov |
| 1969 | JU | Novi Sad 42-a SAT | sp pk |
| 1969 | SVE | Tyresö. Junularo | pk |
| 1969 | IT | Como. 40-a nacia | kov |
| 1969 | PO | Miedzygorze E-ferio | E-pk aŭ kov |
| 1969 | PO | Bystrzyca Kl. E-renkonto | E-pk aŭ kov |
| 1969 | PO | Bialystock. 110-a naskiĝtago | E-pk aŭ kov |
| 1970 | MO | Monte Carlo. Varbstá. 3.a tipo | pk aŭ kov |
| 1970 | pO | Poznan Tago de virinoj | pk aŭ kov. |
| 1970 | GE | Aachen. trilanda kgr | sp pk aŭ kov |
| 1970 | PO | Szczecin. Jubilea jaro | pk aŭ kov |
| 1970 | SVE | Jönköping. nacia kgr | pk aŭ kov |
| 1970 | IT | Rimini 22-a IFEF | sp pk aŭ sp kov |
| 1970 | PO | Krakow. Lenin | sp pk aŭ kov |
| 1970 | CE | Opava. kulturfestivalo | pk aŭ kov |
| 1970 | CE | Podebrady renkontiĝo | sp kov aŭ kov |
| 1970 | HU | Gyula. 8-a SEU | pk |
| 1970 | HU | Abaliget. naturamikoj | pk ni aŭ kov ve |
| 1970 | PO | Bialystock. kulturfestivalo | pk aŭ kov |
| 1970 | HI | Mieres. 30-a nacia | pk aŭ sp kov |
| 1970 | JA | Takatuki. nacia kgr. | pk aŭ sp kov |
| 1970 | GE | Augsburg. 43-a SAT. jaro 1970 | pk aŭ kov |
| 1970 | GE | Augsburg. " jaro 70 | pk aŭ kov |
| 1970 | AU | Wien. 55-a UK | pk cif 3, kov 1-4 |
| 1970 | GE | Glauchau. Varbsta | pk aŭ kov |
| 1970 | GE | Oschatz " | pk aŭ kov |
| 1970 | GE | Wismar " | pk aŭ kov |
| 1970 | PO | Miedzygorze E-ferio | pk aŭ kov |
| 1970 | PO | Bystrzyca Kl. renkonto | pk aŭ kov |
| 1970 | PO | Gdansk. 25 jaroj | pk aŭ kov |
| 1970 | PO | Bialystok. Kores[illegible] | pk aŭ kov |

| | | | |
|---|---|---|---|
| [illegible] | | | |
| [illegible] | | | |
| 1971 | PO | Poznan. Tago de virinoj | pk aŭ kov |
| 1971 | FR | Lyon. verbsta. mallarĝa | pk aŭ kov |
| 1971 | FR | Lyon. 63-a nacia | kov |
| 1971 | GE | Nürnberg. 49-a nacia | sp pk aŭ sp. kov |
| 1971 | PO | Poznan. foiro | pk aŭ kov |
| 1971 | JU | Maribor. 23-a IFEF | pk aŭ sp kov |
| 1971 | PO | Krakow. Kopernik | pk aŭ kov |
| 1971 | PO | Miedzygorze. feriado | pk aŭ kov |
| 1971 | PO | Bialystok. kulturfestivalo | pk aŭ kov |
| 1971 | SVE | Stockholm. nacia kgr | kov |
| 1971 | HI | Alicante. 31-a nacia | sp pk aŭ pk |
| 1971 | BR | London. 56-a UK | pk aŭ kov |
| 1971 | IT | Grosseto. 42-a nacia | pk aŭ kov |
| 1971 | PO | Krakow. Grabowski | pk aŭ kov |
| 1971 | CE | Vsetin. renkonto | pk aŭ kov |
| 1971 | PO | Kartuzy. Tago de E-libro | pk aŭ kov |

Frankotipoj.

| | | |
|---|---|---|
| IT | Biblia Revuo. Ravenna | pk aŭ kov |
| GE | Dollbergen. H. Sonnabend | kov |
| GE | Lohne. H.Behrmann | pk aŭ kov |
| GE | Nürnberg. L. Pickel | pk aŭ kov |

------

Polaj E-pk estas sur E-tutaĵoj kaj valoras 3 rpk.

------

Por po 4 menditaj stampoj sendu 1 rkp por resendo, ĉar la poŝta tarifo estas altigita.

†

## JOZEFO STANISLAO BOSCARINO

La konata itala advokato en Ragusa mortis la 21.10.1971 en la aĝo de 72 jaroj. Li esperántiĝis jam en 1913, kaj li ĉiam estis fervora propagandisto por nia lingvo. Dum multaj jaroj delegito de UEA. Li ankaŭ estis fervora kolektanto de Esperantaĵoj. Kelkfoje li mem eldonis glumarkojn: la konataj markoj kun turismaj motivoj de Sicilio. Inter ili la datita marko pri la unua kunveno de siciliaj Esperantistoj en Catania, vidu nr. 394 en la Glumark-katalogo. Speciala folio sur dika kartono kun 9 diversaj markoj venis en 1955 okaze de la 10 jara jubileo de la sicilia delegacio de la itala Esp-federacio (nr.446). Tiu aktiva samideano estis laŭ leteroj al mi tre kontenta esti AREK-ano dum la lastaj jaroj.

Li ripozu en paco!

†

## HELMUT RATH

Neatendita la morto jam ree gastis nian italan rondon la 4. 12. 1971 kaj forprenis Helmut Rath, La aktiva kolektanto, kiu ankaŭ mem eldonis glumarkojn. Tio okazis en 1955, kiam li represis la konatan serion de 16 markoj de la provinco Friulio. Li certe ne spinis oron pro tiu afero. (nr. 441).

Li estis naskita en Aŭstrujo, kaj pro lia dulingveco li estis ofte uzata kiel gvidisto por turistaj ekskursoj en germanlingvaj landoj.

Li havis grandan intereson por glumarkoj, kaj el Esperantaĵoj li kolektis nur tiujn.

Li ripozu en paco!

14) Poste estis eldonita marko kun iom pli da teksto: Teleac presenteert Esperanto van af december op de T.V. met KEES VAN KOOTEN en WIM DE BIE (fotoj). Teleac Postbus 2414 Utrecht. Nigra kaj verda preso sur blanka. Pap. 49x70. trĉ.

15) AVA 1971. Serio eldonita en Vendrell, Hispanujo. Fol.215x157 mm enhavas 5x5=25 diversbildajn markojn. A. dent. B. nedent. Ĉiuj markoj havas la tekston: AVA 1971. Markoj en la supra kaj la plej malsupra vicoj havas krom tiu la pluan tekston: Lukto Kontraŭ la Tuberkulozo, dum la markoj en la 3 ceteraj vicoj montras diversajn primitive desegnitajn bildojn de ludiloj aŭ fantaziaj bestoj. 2 preskoloroj sur 3 koloroj de papero.

GLUMARKOJ 1972. (Daŭrigo)

4) 27a kgr de SAT-amikaro, Narbonne, Francujo. 2-4/april 1972. (V)(35x40). Dent. fol.5x2=10. Nigra sur verda. Malnova konstruaĵo.

5) 45a Esp-kgr de SAT. Kuopio, Finnlando. (SF 22-28/7 1972. (V)(32x44). Strio kun 10x1. trpk vertikale. Bildo de tre alta masto kun restaŭracio ktp. Nigra, ruĝa kaj verda.

6) 3a int. E.tendaro, Karl Marx Stadt. DDR. 24/7 - 1/8 1972. La en lasta numero anoncitaj markoj nun aperis. Folio entenas supre talonon trans la tuta foli-larĝo: 150x32 mm kun teksto pri la E.tendaro en 1972 kaj Festivalo de la mondjunularo en Berlin 1973. Sub tiu talono grupiĝas 6 div markoj (3x2)
1) 3 kapoj kaj E.stelo + teksto
2) virino de Vjetnamio + teksto
3) rondaĵo kun Angela Davis + teksto
4) tekst kontraŭ US-krimoj en Azio
5) tekst kontraŭ Hiroshima kaj Nagasaki
6) tekst kontraŭ San My, Lidice, Aŭschwitz.

Daŭrigo de paĝo 4:

Sendentaj folioj. Preso blua sur paperoj:
a) hela grizblua, b) helflava, c) helroza.
Eldonkvanto: po 1500 folioj (ent. 4500 fol.)

Oni devas ja pripensi, ke Esperanto estas permesata por uzo ankaŭ pri ne-neŭtralaj temoj, kaj ĉi tie oni vere utiligis tiun permeson.
Interesuloj povas aĉeti la markojn ĉe Rudolf Burmeister, membro nr. 8. 3 fol. kostas 0,60 Gmk = 1 rkp + afranko. 3 serioj kostas 3 rkp + 1 rkp por afranko.
Kovertoj kaj kartoj kun iom pli grandaj bildoj de markoj 1, 2 kaj 3 estas faritaj.
Spaciala, granda koverto uzebla por sendo de Fenikso estis senpage donita de la eldoninto.
Por tio koran dankon!

-oOOo-

Poŝtstampoj 1971. (daŭrigo)

20) Kartuzy. Pollando. 15. XII. 1971. Dulingva stampo por: Internacia Tago de Esperanto-Libro. (E.stelo kaj 2 libroj).
34x36 mm. (Sendis Bielak).

ADRESITAJ KOVERTOJ

S-ro Werner Heimlich skribis i.a.... Via artikolo en Fenikso, ke stampo sur pk aŭ kov sen adreso estas ne kolektinda, estas granda eraro, ĉar por kolekto ankaŭ povas esti grava eĉ stampo sen poŝtmarko. La kolektado de stampoj tute ne devigas la kolektanton nur preni adresitajn pecojn.....

Kara amiko! mi ne diris, ke stampo sur ne-adresita koverto estas ne-kolektinda, mi diris, ke ĝi fakte estas senvalora. Mi ĉiam diris, ke la kolektantoj mem decidas pri la kvalitoj de iliaj stampoj. Se ili nur deziras havi memor-

aĵojn (materialojn) de la kongresoj, bonvolu kontentiĝi pri stampoj sur kongresaj paperoj, eĉ sen poŝtmarko. Sed memoru, ke tiam temas nur pri persona memoraĵo sen valoro en la interŝanĝado. Kaj kial preni tiujn stampaĵojn sur pk aŭ kov kun malalta valoro de pm kaj tiamaniere ŝajnigi poŝta uzo, kio ja ne okazis.?

Se oni parolas pri stampoj en la filatela signifo, kaj tio estas ja la unuanura simpla solvo, oni devas havi poŝtaĵojn plene afrankitajn por iu ajn poŝta transporto. Kaj tiam la adresoj estas necesaj en sama rango kiel la poŝtaĵo mem. La poŝto ne ekspedas senadresitajn sendaĵojn de tiaj specoj.

La afero estas nun, ke oni havas diversajn ekspedformojn de tiuj poŝtaĵoj: en- kaj eksterlandaj leteroj, kartoj, salutkartoj (kun 5 vortoj) kaj presaĵoj. Sed absolute plej grava estas, ke la afranko sufiĉas por la "ŝajna ekspedo". Oni ja ne bezonas leterafrankon, kiam oni sendas stamp-saluton al amiko eksterlanda. Oni povas kontentiĝi per afranko kiel "presaĵo", kio kutimas esti nur la duono (ĉi tie 40 kontraŭ 90), se oni nur lasas la koverton nefermita kaj metas pecon de ordinara gazetpapero en ĝi. (Tio ja ankaŭ estas "presaĵo", kaj la tarifa konscienco de la poŝto estas en ordo).

Kiel mi ankaŭ antaŭe skribis, se oni nur sendas kovertojn, kiuj almenaŭ estas plene afrankitaj por tia servo, - oni bone povas ŝpari mem skribi la adreson, ĉar eble la ricevanto deziras mem skribi iun adreson, kaj al tio li rajtas. Sed - se oni sendas eksterlanden koverton afrankitan nur por enlanda sendaĵo, oni devus havi la devon adresigi ĝin al iu ajn rilate al la afranko, - por ke la ricevanto ne estu tentate skribi sian propran adreson sur tia koverto kaj tiamaniere fari "minusobjekton" al sia kolekto.

Komprenu, ke ĉiu ajn objekto -adresita rilate al la afranko- estas valora kaj aŭtentika,

dum objekto ne sufiĉe afrankita kaj sen adreso estas daŭra tento por estonta posedanto skribi adreson, kiu poste pruvos la ne-poŝtecon kaj la amatorecon de la objekto.

Mi scias tion, ĉar mi mem antaŭe ofte falis en tiu kaptilo kaj senatente detruis kovertojn en mia kolekto per skribado de mia propra adreso; objekto kiu povus esti savita, se mi nur antaŭe studis la tarifon kaj estus skribanto lokan adreson.

Estas tio, kion mi per tiu kampanjo deziras eviti. Tial mi denove ripetas: Neniu objekto kun afranko por certa enlanda transporto devas esti elsendita al kolektanto sen surskribita adreso. Nur se objekto estas plene afrankita por eksterlanda ekspedo, oni povas riski sendi ĝin sen adreso al amiko eksterlanden.
Kaj neniam lasu stampi kovertojn kun malgranda pm-valoro, kiu ne sufiĉas por iu ajn servo.
Tiaj stampaĵoj sufiĉas sur paperpecoj - eĉ sen poŝtmarkoj, kaj tiaj stampaĵoj povas esti utilaj por kolektantoj - sed ili ne havas "valoron"

La postulo pri adresoj komprenoble nur valoras, se oni kolektas stampojn sur tutaj pk aŭ kov. Je detranĉaĵoj oni povas uzu ĉion.

Vere estas mirinde, ke kolektantoj de Esperantaĵoj ne tuj de si mem komprenas tion.
Estas terure pensi pri tiu "maro" de senadresaj kovertoj kaj kartoj, kiuj cirkulas inter kolektantoj. Ke multaj kolektantoj kontentiĝas pri tiaj pecoj estas bedaŭrinda fakto, sed tio havas laŭ dana "proverbo" "neniun rilaton al piedpilk-ludado".

Se ni deziras, ke nia fako ankaŭ estonte havu valoron kaj estimon, ni vere mem devas taksi laŭ prudenta metodo . filatela metodo.

Reinhold Jensen

---

Al tiuj membroj kiuj ne ankoraŭ ordigis la kotizo 1972: Faru tion plej eble baldaŭ.

□